

Esperanto 125 en Liaoning de Ĉinio (1)

---Interesa grupo de Esperanto-aktivecoj en la 14-a Supera Mezlernejo de Dandong

La 15-an de majo oficiale komenciĝis Aktivecoj de Interesaj Grupoj de la 14-a Supera Mezlernejo de Dandong. Kiel unu el kvar grupoj Interesa Grupo de Esperanto-aktivecoj (IGEA) gvidata de s-ino Li Yanqiu partoprenis en la inaŭgura ceremonio. Tio estas alia nova agado stimuli kaj konduki studentojn al Esperanto-lerno detempe de la lerneja decido enkonduki Esperanton kiel studobjekton de la dua klaso en 2011.

IGEA orientiĝas al la 1-a grado kaj la 2-a grado de malsupera mezlernejo, kaj al 1-a grado kaj la 2-a grado de supera mezlernejo, okazas po unufojo semajne, t.e. la lasta leciono de mardo, ĉirkaŭ unu horo. Neatendite pli ol 60 studentojn ĉeestis al ĝi, duoblas pli ol la studentoj en la dua klaso de Esperanto kaj unufoje aperis studentoj el supera mezlernejo. Tiutage s-ino Li detale prezentis al ili Esperanton kaj ĝian kreinton Doktoro L.L. Zamenhof. Ŝi diris: “okazo de IGEA estas tre signifa, ĉar ĉi-jaro estas la 125-a datreveno de Esperanto, nun esperantistoj en diverslandoj estas festantaj tion per diversaj formoj, okazo de IGEA estas la plej bona reago al tio”. La studentoj sentis plezuron pro partopreno en IGEA, kaj esprimis ke ili diligente lernos Esperanton.

Laŭ s-ino Li la dua klaso kaj IGEA estas esplorataj kaj praktikataj por instruado kaj popularigo de Esperanto en la lernejo, kaj per la Esperanto-aktivecoj por vaste konigi la mondon al studentoj, efike kulturi intereson de studentoj kaj plibone disvolvi personecon de studentoj. Ŝi aparte esperas ke esperantistoj el diversaj landoj donu gvidon kaj helpon je la supremenciitaj flankoj, kaj bonvenigas spertajn esperantistojn prelegi en la lernejo.

De la dua klaso al IGEA oni vidas ke la estraro de la 14-a Supera Mezlernejo de Dandong tre subtenas Esperanton. La estraro de la lernejo staras alte kaj vidas malproksimen. Tion pravas la parolado de s-ro Yu Peng, estro de la lernejo, ĉe la ceremonio. Li diris: studentoj de interesaj grupoj devas teni la tutan mondon antaŭ la okuloj, havi volon fariĝi pilieraj talentuloj kaj per la interesaj grupoj konstrui pontojn de komunikado, amikeco kaj sukcesoj.

La lernejo kaj tiuj studentoj estas kontakteblaj tra s-ino Li Yanqiu (lyqsszz@126.com)

Raportis Wu Guojiang

Vic-prezidanto de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio

Retadresoj: ghemelurboj@yahoo.com.cn amikeco999@21cn.com



Studentoj el IGEA



S-ino Li Yanqiu prelegis en IGEA